# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 29/02/2024 sescentsepdeksesa eldono (unua eldono 26/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

Ne estas facîla elekti el al ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

**KIO STARIGIS LA HOMON** 23A DE FEBRUARO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 2a de marto estos la unua sabato.

Venu! 02 9976 6320 *Roger Springer*

## Kopirajta materialo.

La celo de AE estas sendi fotojn kaj informojn pri kio okazis en la Esperanto-movado en Aŭstralio, pri niaj kluboj, pri vojaĝoj de aŭstraliaj esperantistoj ie en la mondo kaj interkonigi la Esperantistojn de la grandega lando, Aŭstralio.

La espera profito estas kunigi Aŭstraliajn Esperantistojn, tute ne pri monaj aferoj. *Roger Springer*





Dum niaj vojaĝoj Sandor kaj mi (Helen) renkontis du esperantistojn en Canberra: Giles kaj Catalin. Ni multi babilis (esperante konpreneble).

Se iuj aliaj vojaĝos al nia nacia urbo mi certas ke tiuj du ŝatus babili ankaŭ kun ili.

Ĝis *Helen Palmer*



"La Melburno-Esperanto klubo renkontiĝis pasintan semajnon kun 3 vizitantoj el Adelajdo, Sandor, Helen kaj Charles. Venis ankaŭ 2 novaj Esperantistoj. Ni ĝuis vesperon kun teatraj ludoj kaj bongustaj manĝetoj en nia tepauzo. Ni nun renkontiĝas sur la 2a etaĝo de Ross House. *Heather Heldzingen*



## AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 22-a de februaro 2024

Ĉeestis: Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Esther Parris, Bradley McDonald, Caroline Turner

### (1) Bona novaĵo: $50.000

AEA heredis $50,000 de Dorothy Enderby.

Ankaŭ aliaj asocioj heredis

| | |
|---|---|
| UEA: | $ 100,000 |
| SAT: | $100,000 |
| ESPERANTO CIVITO | $ 100,000 |
| ESPERANTO NSW | $ 50,000 |
| ESPERANTO MELB | $ 50,000 |

### (2) Ballarat: Fina(?) bilanco

Heather ankoraŭ luktas kun la fina pago al Ballarat Universitato.

### (3) Somerkursaro 2025

Propono de Esther: New College UNSW en Sidnejo

Ni diskutis. … Ege similis al la prezoj de nia lasta somerkursaro

Aliaj proponoj ? Jonathan refoje enketos ĉe Sophia Women's College Adelajdo?

### (4) Ejo en Melburno?

Heather kaj Joanne proponis aĉeti ejon en Melburno kun ebla financa helpo de NSK kaj UEA

### (5)Arkivoj

Kelkaj labortagoj en Sidnejo? Eble post pasko? Ni pensu! Kontaktu nin, se vi ŝatas partopreni

### Venonta estrarkunveno



Ĵaŭdon, la 7-an de marto 2024 *Joanne Johns*

## Pri Esperanto-domo (2) Ĝo kaj Heather



Do mi gratulas vin pro via kuraĝo. Se sukcese havu planon por enspezi monon, ekz. luigo de la ejo aŭ parto de ĝi kiam Esp. Vik ne uzas ĝin. En NSK estas la fabriko kiu pagas la kostojn. Antaŭ tridek-kvardek jaroj Esp. Okcidentaŭstralio havis ejon, komence domon, poste oficejon. Iom post iom la kostoj formanĝis la eblecon daŭrigi la posedon de la ejo, kaj ne plu estis. Eble Vera Payne povas klarigi tiun sperton, mi opinias. *Terry Manley*

## 3ZZZ En la elsendo de la 26a de februaro 2024



estas invito de Katja Steele al artgalerio , vidpunkto de Anna Löwenstein pri instruado de bibliaj legendoj en lernejoj kaj informoj pri la traktado de lesbaj paroj kaj ties infanoj en Italujo *Franciska Toubale*

**Renato Corsetti** pri la artikolo de Trevor Steele en AE675



La parolado evidente estas invento de Trevor sed ĝi estas tiel bona, ke mi ŝtelis ĝin el la reta revuo Aŭstraliaj Esperantistoj por ke vi legu ĝin.

Amike *Renato Corsetti*




Via ŝtelo estas aprobita de la aŭtoro. Probable vi eĉ ne trovis neologismojn en ĝi ...

Amike, *Trevor Steele*

***PRELEGO EN ANGLA LINGVO: KIEL ORGANIZI ESPERANT-FILMFESTIVALON EN PEKINO***

Nia gastparolanto, Rainer Kurz el Stuttgart, Germanio, sekvis inviton de la ĉina eksterlanda dissenda servo – Ĉina Radio Internacia – por doni multajn prelegojn en Pekino kaj Tjanĝino, kaj organizis la Pekinan Esperanto-Filmfestivalon, la unuan en la internacia lingvo en Ĉinio. En ĉi tiu renkontiĝo li prezentos siajn spertojn kiel preleganto en Ĉinio pri temoj kiel demokratio, kiel Germanio traktas sian Stasi-pasintecon kaj kiel organizi filmfestivalon kun ĉinaj partneroj. Post la kafo kaj tepaŭzo (senpage disponigita), Rainer prezentos la bazajn faktojn kaj ideojn de Esperanto kaj montros kiel uzi Esperanton en Sidnejo kaj la mondo.

Dr. Rainer Kurz (naskiĝis en 1962), eksprezidanto de Germana Esperanto-Asocio, unue studis Esperanton en 1988. Kadre de la tutmonda Esperanto-movado li vizitis pli ol 40 landojn kaj aktivas en diversaj estrarpostenoj de landaj kaj internaciaj Esperanto-asocioj kaj fondaĵoj, inkluzive kiel gazetara reprezentanto por Esperanto-Germana Asocio. Li iniciatis la Internacian Kurtfilman Konkurson "Esperanto 125 Jaroj", kiu ricevis 56 aliĝojn el 19 landoj (filmoj videblaj ĉe https://www.youtube.com/user/filmkonkurso).
6a de marto 2024, je la 5a posttagmeze, Esperantodomo, 143 Lawson Street, 2016 Redfern.
Registrado por partopreni: https://www.meetup.com/de-DE/esperanto-in-sydney/events/299364456



Bildo: Esperanto-teamo ĉe "China Radio International"

Ĝis baldaŭ
*Rainer Kurz*